# La atesto de Faustino Castaño



Ekde mia infanaĝo mi sciis pri la ekzistado kaj la celo de Esperanto. Tamen dum la unuaj tri jardekoj de mia vivo neniam mi pensis lerni tiun lingvon kaj eĉ malpli fariĝi aktivulo por ties disvastigado. Miaj filologiaj interesoj adresiĝis aliflanken. Dum multe da tempo mi lernis la francan lingvon. La anglan mi nepre devis lerni por mia profesia laboro (informadiko). Krome dum mia gimnazia studado mi lernis ankaŭ la latinan kaj la grekan lingvojn. Kiam mi estis tridekdujara mia intereso estis lerni la hebrean por legi la Biblion en ties originala lingvo. Sed en tiu epoko (jaro 1975) ne eblis al mi trovi en mia lando lernolibrojn kaj vortarojn pri tiu lingvo. Tiam, hazarde, mi vidis anoncon komunikante la baldaŭan komenciĝon de kurso de Esperanto en mia urbo. Tion vidinte, venis al mi la ideo ke, ĉar estas esperantistoj en ĉiuj landoj, mi povus, pere de Esperanto, interrilati kun esperantistoj el Israel kaj akiri, pere de ili, lerno-materialon pri la hebrea.
Do, mia komenca intereso pri Esperanto estis profit-cela, kaj aliĝinte al tiu kurso, kiun gvidis Santiago Mulas, mi konstatis ke Esperanto estis la plej facila el ĉiuj lingvoj kiujn mi estis lerninta. Post kvarmonata lernado mi flue paroladis en Esperanto, kaj post la finiĝo de la kurso mi ĉeestis landan E-kongreson en El Ferrol, en kiu estis, ankaŭ, kelkaj eksterlandadoj. Tiam estis por mi granda surprizo sperti kiom facile estas interkomunikiĝi kun alilingvanoj pere de Esperanto. Tio ne estis okazinte al mi kun la ceteraj idiomoj kiujn mi lernis. De tiam mi fariĝis entuziasmulo de la Zamenhofa lingvo; ŝajnis al mi frenezaĵo ke la homaro ne alprenis tiun lingvan solvon de antaŭ multe da tempo por la tutmonda interkomunikado. Mi fariĝis aktivisto de la Esperantista movado, gvidis kursojn, partoprenis en la organizado de E-kongresoj, verkis multajn artikolojn en tiu internacia lingvo, aliĝis al kelkaj Esperantaj organizaĵoj, propagandis pri Esperanto ĉiam, kiam eblis tion fari, en intervjuoj presaraj, radiaj, televidaj... Nun mi okupiĝas pri la ellaborado de la revuo HELECO de Astura Esperanta Asocio kaj la demarŝado de la interreta paĝo de tiu E-rondo.
Mia esperantista aktivado ne estas limigata al mia urbo. Kune kun aliaj samideanoj, mi kunlaboris en la starigo de la hispana sekcio de MEM (Mondpaca Esperantista Movado) kaj dum kelkaj jaroj mi rolis kiel Prezidanto de IKEK (Internacia Komunista Esperantista Kolektivo).
Pri la unua E-kurso kiun mi gvidis, tiu de la lerno-jaro 1980-1981, mi havas ian neforgeseblan memoraĵon. Vespere de iu tago de februaro 1981 (kiu poste estis konata kiel 23-F) mi estis en mia hejmo, post la alveno el la fabriko, kun granda kapdoloro, Tiumatene estis tre intensa la sindikata aktivado de la Komitato de la ENSIDESA-fabriko, al kiu mi apartenis. Sed tiutage estis E-klaso kaj mi volis ĉeesti ĝin spite al la migreno. Kiam mi pretis eliri el la hejmo por adresiĝi al la sidejo de la E-grupo, alvenis mia edzino kaj diris al mi ke ŝi ĵus vidis ie televidan elsendon montrante ke io grava estis okazante en la Parlamentejo de la lando. Ŝajne militistoj eniris tien perforte, pafante… Mi tuj alkuris ŝalti la televid-aparaton kaj konstatis ke, ja, estis vera puĉo survoje. Survoje sed haltigita ĉar dum multaj horoj oni ne sciis kion povus rezulti el tio. Mi devis decidi kion fari, kaj ĉar ne eblis al mi iamaniere efiki sur tiuj okazantaĵoj, mi decidis iri gvidi la E-klason kvazaŭ nenio grava estus okazante. Dum la klaso mi neeviteble estis pensanta ke eble tio estos mia lasta faro, ĉar se sukcesus la puĉistoj sendube okazus en mia lando la kutimaj masakroj kaj reprezalioj oftaj en similaj kazoj, kaj mia nomo sendube troviĝus en ĉiuj listoj kiujn tiuj personoj povus ellabori por la masakrado.

Alia menciinda aktivado de membro de nia E-rondo estis tiu de samideano Sacramento Collado Llana. Dum multaj jaroj li okupiĝis pri la propagando de Esperanto antaŭ la socio, ĉefe pere de presaro. Inter la tuno da paperaĵoj de la arkivo de nia asocio, kiujn ni devis traserĉi por la ellaborado de ĉi tiu historio, ni trovis multenombrajn eltranĉaĵojn de ĵurnaloj kun artikoloj, notoj kaj informoj, pri Esperanto kaj esperantistaj eventoj, verkitaj de samideano Sacramento, kiujn li sendadis al la ĵurnaloj por publikigo.




Ses anoj de nia asocio partoprenis en la 40a Hispana Kongreso de Esperanto en Madrido. Tie ili kontaktis kun iu aktiva esperantistino el Bulgario, Lili Koleva, kiu estis invitita viziti nian urbon. Ŝi faris tiun viziton dum la tagoj 28a al 31a de julio. De la 2a al la 9a de aŭgusto okazis en Stokolmo la 65a Universala Kongreso de Esperanto. Ĉeestis ĝin, kaj reprenzentis tie nian **A. E. Asocion**, nia samideano Julio Argüelles.

Nia asocio sendis anoncon al kelkaj E-revuoj je tutmonda disvastiĝo mendante leterojn kaj poŝtkartojn por la lertervespero kiun ni planis fari fine de la E-kursoj de la lernojaro 1980-1981. Ni ricevis amason da tiuj poŝtaĵoj kaj la letervesperoj, fine de la kursoj, estis vere riĉenhavaj. Krome kelkaj el la novaj gelernintoj abonis iujn E-gazetojn, ĉefe **"El Popola Ĉinio"**.
Alia aspekto de nia aktivado estis tiu de la esperantista festo, kutime nomata Zamenhofa Tago ĉar